Franz Freiherr von Dingelstedt,

# Ĉe la Weser

*tradukita de H. W. Funk*

Jam ofte sidadis mi tie ĉi
Kun mia liuto, kantante;
En valon profunden rigardis mi,
Pri mond', pri mi mem forgesante.

Kaj sonis muziko majeste en rond',
Kaj super mi lumis lazuro;
Malsupre arĝente brilegis la ond'
De l' Weser kun brua murmuro. —

Kaj kiel el buŝo de amatin'
Tra l'arboj sonetis kantajoj;
El fundo de l'valo salutis min
Plej belaj, plej ĉarmaj revaĵoj.

Kaj sonis muziko majeste en rond',
Kaj super mi lumis lazuro;
Malsupre arĝente brilegis la ond'
De l'Weser kun brua murmuro. —

Denove mi sidas nun tie ĉi,
Sopiron en koro mi tenas;
Aŭdiĝas ne plu la melodi',
La revoj neniam revenas.

La bildoj, la belaj, nun estas for, —
Ĉielo sen luma ornamo…
Adiaŭ, beltempo, iama trezor',
Adiaŭ, ho revoj de l'amo!

…

Franz Freiherr von Dingelstedt,

# Ĉe la Vezero

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kun mia liuto tie ĉi
Multfoje surmonte mi sidis,
Min mem kaj la mondon forgesis mi,
Dum tiun ĉi valon mi vidis.[4]

Kaj plena estis de hela bril'
Kaj gaja sonor' la aero,
Bruadis malsupre la akvobaril',
Briletis la ond' de l' Vezero.

Flustradis kvazaŭ defore tra l'
Arbaro de l' am melodioj,[5]
Kaj el la aperta grundo de l' val'
Salutis min sonĝaj vizioj.

Kaj plena estis da hela bril'
Kaj gaja sonor' la aero,
Bruadis malsupre la akvobaril',
Briletis la ond' de l' rivero.

Denove mi sidas nun tie ĉi,
La kantojn malnovajn mi penas
Reaŭdi, sed vane aŭskultas mi,
La sonĝoj jam ne plu revenas.[6]

La dolĉaj bildoj forestas jam
Sub morna ĉielo premata!
Adiaŭ, adiaŭ, vi sonĝoj de l' am'!
Adiaŭ, vi tempo beata!

…

[4] aŭ:
Kun mia liuto tie ĉi
Multfoje mi estas sidinta,
Envalen vidante estas mi
La mondon kaj min forgesinta.

[5] aŭ:Arbaro amkant-melodioj,

[6] aŭ: La sonĝoj ne plu revenas.

*Traduko de la Germana poemo "An der Weser" de* Franz Freiherr von Dingelstedt *(∗1814-06.30 – †1881-05-15) en Esperanton de H. W. Funk.*

*Arg-424-1387 (2012-12-13 11:33:32)*

*Tiu ĉi poem-traduko estas trovebla en* `http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto`*, pli precize en* `http://kantaro.ikso.net/cxe_la_vezero`*. Ĝi aperis unue en la kant-libro "Das deutsche Lied in Esperanto", eldonita en 1921 de Friedrich Pillath.*

*Traduko de la Germana poemo "An der Weser" de* Franz Freiherr von Dingelstedt *(∗1814-06.30 – †1881-05-15) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1989-06-20.*

*MR-228-1 / Arg-424-836 (2012-11-01 16:19:41)*

*La teksto troveblas ankaŭ sub* `http://www.volksliederarchiv.de/text2521.html`*. Vídu ankaŭ:* `http://www.axelschaefermdb.de/files/4/1884-das_weserlied.pdf`*.*